



## Chapter 6

# Ana Pana 11–21

|                               |    |
|-------------------------------|----|
| Intro.....                    | 2  |
| Part 11 – Vetero.....         | 2  |
| Part 12 – Biciklado.....      | 4  |
| Part 13 – Kion vi faros?..... | 5  |
| Part 14 – Studoj.....         | 7  |
| Part 15 – Malsataj.....       | 9  |
| Part 16 – Humoro.....         | 10 |
| Part 17 – Kiel sentiĝas?..... | 12 |
| Part 18 – Longa vojaĝo.....   | 13 |
| Part 19 – Hejme denove.....   | 15 |
| Part 20 – Lingvoj.....        | 17 |
| Part 21 – Ĉu ankaŭ vi?.....   | 18 |
| Answers to the exercises..... | 20 |

## Introduction

In this chapter we have parts 11–21 of the basic course “Ana Pana”. These parts are somewhat more difficult than the first ten, but hopefully not too difficult! Feel free to go back to Chapter 2 to repeat the basics before continuing with Ana Pana.

The idea for each part of the course is for you to:

1. read through the new words and their translations;
2. read a short text about Ana;
3. get explanations about the language used in the text;
4. answer questions about the text;
5. try to translate the short text about Ana.

Answers to the exercises are found at the end of this chapter.

The texts are also in MP3 format so you can listen to them. We recommend listening often. Download the MP3 files from [www.ikso.net/libera](http://www.ikso.net/libera).

If you have any questions or comments while following the course, you are always welcome to write to [libera@ikso.net](mailto:libera@ikso.net).

---

## Part 11 – Vetero

### New words for Part 11

vetero – weather  
hieraŭ – yesterday  
espereble – hopefully  
kun – with  
grado – degree  
tro – too  
freŝa – fresh  
printempo – spring

vintro – winter  
neĝi – snow  
suno – sun  
varma – warm  
perfekte – perfect  
super – over  
aero – air  
kontrasto – contrast

pluvi – rain  
esperi – hope  
brili – shine  
ĉirkaŭ – around  
laŭ – according to  
aŭtuno – autumn  
iom – somewhat  
somero – summer

## Text for Part 11

Estas vintro nun en Novjorko. Pluvas... Hieraŭ neĝis kaj hodiaŭ pluvas. Bona vetero por legi libron... Espereble la suno brilos morgaŭ, ĉar tiam mi biciklos kun amiko. Fakte al mi pli plaĉas somero ol vintro. Dum somero ofte estas varma vetero ĉi tie. Mi tre ŝatas, kiam la suno brilas! Kiam estas ĉirkaŭ dudek kvin (25) gradoj celsiaj (77 farenhejtaj) estas perfekte, laŭ mi. Por mi estas tro varme, kiam estas sune kaj super tridek (30) gradoj celsiaj (86 farenhejtaj). Post somero estas agrable, kiam aŭtuno venas kun freŝa aero kaj iom da pluvo. Kaj post vintro estas agrable, kiam printempo venas kun pli varma vetero. Kontrastoj bonas... Suno venu!



## Hints on the text of Part 11

**pluvas, neĝas:** To say it's raining, we just say **pluvas**. For snow: **neĝas**. In English and some other languages, these sentences add a dummy subject: "It is raining." In Esperanto there is no such dummy subject. E.g.:

- Estis agrable renkonti vin. (It was nice meeting you.)
- Kostas neniom provi. (It costs nothing to try.)

**ĉu:** As you know, we use **ĉu** to create questions with a yes/no answer. **Ĉu** is also used to report such questions indirectly. E.g.:

- Mark demandis, ĉu Ana volas veni. (Mark asked if Ana wanted to come.)
- Mi pripensas, ĉu mi iru aŭ ne. (I'm thinking about whether I should go or not.)
- Ŝi ne diris, ĉu tio gravas aŭ ne. (She didn't say if that's important or not.)

**-a kaj -e:** It can be hard to know when to use the **-a** ending (adjective form) and when to use the **-e** ending (adverb form). For example:

- La vetero estas varma. (**Varma** describes the noun **vetero** and is therefore an adjective.)
- Estas tro varme ĉi tie. (**Varme** describes a circumstance and is therefore an adverb.)

In summary, if you're describing a noun, use **-a**; if you're describing a verb, a sentence, a situation, a prepositional phrase, etc., use **-e**. Here are a few examples:

Ŝia rakonto estas interesa. (Her story is interesting.)

Ŝi rakontas interese. (She tells her story in an interesting way.)

Tio estas bona. (That is good.)

Estas bone ĉi tie. (It's good here.)

La ĉambro estas varma. (The room is warm.)

En la ĉambro estas varme. (It's warm in the room.)

## Questions for Part 11

- 1) Kia estas la vetero ĉe Ana?
- 2) Kia estas la vetero dum vintroj ĉe vi?
- 3) Ĉu vi ŝatas someron?
- 4) Kia estas la vetero ĉe vi hodiaŭ?

## Part 12 – Biciklado

### New words for Part 12

vento – wind  
proponi – to propose  
jam – already  
bezoni – to need  
ek – start  
antaŭ – before  
dekstre – right

pensi – to think  
ke – that  
ĉiu – each, every  
atingi – to reach  
unue – first  
antaŭe – before  
devas – must

kien – where to  
soni – to sound  
montri – to show  
kutime – usually  
rekte – straight  
antaŭen – ahead  
sekvi – to follow

### Text for Part 12

Mark: – Kiom agrabla vetero hodiaŭ!  
Ana: – Jes, perfekta por biciklado. Sune kaj ne tre vente.  
Mark: – Mi pensas, ke blovos pli poste.  
Ana: – Eble. Sed ne gravas.  
Mark: – Kien ni biciklu?  
Ana: – Mi proponas, ke ni biciklu al Centra Parko.  
Mark: – Sonas bone.  
Ana: – Ĉu vi jam estis tie?  
Mark: – Jes, kelkfoje. Sed mi ne konas ĉiujn partojn de ĝi.  
Ana: – Mi montros la tutan parkon al vi.  
Mark: – Bonege! Kiom da tempo ni bezonos por atingi ĝin?  
Ana: – Kutime mi bezonas ĉirkaŭ kvardek kvin (45) minutojn.  
Mark: – Ĉu ni ekbiciklu?  
Ana: – Jes. Iru unue rekte antaŭen kaj poste dekstren.  
Mark: – Mi pensis, ke ni devas unue iri maldekstren...



Ana: – Ne ne. Ĉu vi volas, ke mi biciklu antaŭ vi?

Mark: – Jes, bone, mi sekvos vin.

## Grammar notes for Part 12

**ek-**: A prefix used to indicate the start of an action, or a sudden action. E.g.:

- vidi (to see)                      ekvidi (to glimpse)
- bicikli (bicycle)                ekbicikli (set off by bicycle)

## Hints on the text of Part 12

**-n for direction**: We saw earlier that the **-n** ending is used to indicate an object, e.g. **Mi vidas vin** (I see you). The **-n** ending also has other applications, such as indicating direction. E.g.:

- kie (where)                                      kien (where to)
- dekstre (right)                                dekstren (to the right)
- Kien vi iros? (Where will you go?)        Mi iros hejmen. (I'm going home.)
- Ili biciklas en tunelo. (They're cycling in a tunnel.)
- Ili biciklas en tunelon. (They're cycling into a tunnel.)

**-u for showing a desire**: Note the sentence **Mi proponas ke ni biciklu...** (I suggest we cycle...). This is an example of the use of **-u** to indicate a desire or intention. There are several such uses of **-u** in the text for this part. Can you find them all?

## Questions for Part 12

- 1) Kien biciklos Ana kaj Mark?
- 2) Ĉu Mark montros la parkon al Ana?
- 3) Kiom da tempo ili bezonos por atingi la parkon?
- 4) Ĉu Ana sekvos Mark?
- 5) Ĉu Ana kaj Mark biciklu unue dekstren?
- 6) Ĉu vi ŝatas bicikli?

## Part 13 – Kion vi faros?

### New words for Part 13

tio – that

fari – to do, make

eduko – education

jes ja – yes indeed

divenas – guess

senti – to feel

demando – question

fariĝi – to become

kontakto – contact

bonŝanca – lucky

ie – somewhere

riĉa – rich

ĵurnalisto – journalist

ĝuste – right

kompreneble – of course

plano – plan

ien – somewhere

onklo – uncle

pagi – to pay  
studi – to study

vojaĝo – trip  
verŝajne – probably

sola – alone  
do – so, then

## Text for Part 13

Ana: – Mark, kion vi faros post la meza lernejo?  
Mark: – Tio estas tre bona demando!  
Ana: – Do, vi ne scias, ĉu?  
Mark: – Mi scias, kion mi ŝatus fari.  
Ana: – Kion vi ŝatus fari?  
Mark: – Mi ŝatus labori kiel ĵurnalisto.  
Ana: – Ĉu vi volas fariĝi ĵurnalisto?  
Mark: – Jes, ĝuste. Espereble mi fariĝos ĵurnalisto post la somero.  
Ana: – Sed vi ne havas edukon kiel ĵurnalisto!  
Mark: – Eduko ne plej gravas. Pli gravas personaj kontaktoj.  
Ana: – Ĉu vi havas tion?  
Mark: – Kion?  
Ana: – Personajn kontaktojn ĉe iu ĵurnalo, kompreneble.  
Mark: – Jes. Aŭ pli ĝuste, mia patro havas tion.  
Ana: – Bonŝanca vi estas.  
Mark: – Ni vidos. Kio pri vi?  
Ana: – Kio pri mi?  
Mark: – Kiuj estas viaj planoj post la somero?  
Ana: – Ne demandu, mi petas.  
Mark: – Mi divenas, ke vi ŝatus vojaĝi ien.  
Ana: – Tute prave. Dum la somero mi vojaĝos al Ĉinio.  
Mark: – Bonege!  
Ana: – Jes, mi sentas min tre bonŝanca. Mia riĉa onklo pagos la vojaĝon.  
Mark: – Ĉu vi iros sola?  
Ana: – Ne, mi iros kun mia Esperanto-amiko el Bostono.  
Mark: – Kaj post la somero vi studos, ĉu?  
Ana: – Jes, tio estas mia plano, sed mi tute ne scias kion studi...



## Grammar notes for Part 13

**-a:** Adjectives end in **-a** and are used to describe nouns and pronouns. E.g.:

- Persona kontakto (Personal contact)
- Vi estas bonŝanca. (You are lucky.)

**-e:** Adverbs often end in **-e**, but there are also adverbs that don't have an **e**-ending. Adverbs are used to describe:

1. a verb                      Ŝi kuras rapide. (She runs fast.)

- |                   |                                                         |
|-------------------|---------------------------------------------------------|
| 2. an adjective   | La domo estas sufiĉe granda. (The house is big enough.) |
| 3. another adverb | Li kuras tre multe. (He runs a lot.)                    |
| 4. a whole phrase | Kompreneble mi iros. (Of course I'll go.)               |

### Hints on the text of Part 13

**sola – sole:** In the sentence **Ĉu vi iros sola?** (Will you go alone?) the word **sola** describes **vi**. You could also say **Ĉu vi iros sole?** but then the word **sole** describes **iros**.

**fari – fariĝi:** Don't confuse **fari** (to do/make) and **fariĝi** (to become). **Fari** is a transitive verb, but like all other **iĝ**-verbs, **fariĝi** is intransitive. So we say **Mi faras mian laboron** (I'm doing my work), but **Mi fariĝos inĝeniero** (I will become an engineer).

**Word order:** Word order is quite free in Esperanto. For example, you can say either **Vi estas bonŝanca** or **Bonŝanca vi estas**. A change in word order can change the emphasis of the sentence; usually the first word carries the main emphasis. (There's more about this in the chapter *Grammatical overview*.)

**baza/meza/alta lernejo:** In Esperanto we generally refer to:

- baza lernejo for kids up to about 15
- meza lernejo for youths
- alta lernejo university or postsecondary school

You will sometimes hear combined forms of these words; for example, **bazlernejo**. There are also more specific words that relate to education, such as **gimnazio/liceo** (high school), **universitato** (four-year postsecondary school), **kolegio** (college).

### Questions for Part 13

- 1) Kion ŝatus Mark fari post la meza lernejo?
- 2) Ĉu Mark havas ĵurnalistedukon? / Ĉu Mark havas edukon kiel ĵurnalisto?
- 3) Kio pli gravas ol eduko por trovi laboron, laŭ Mark?
- 4) Kion Ana faros somere?
- 5) Kial Ana sentas sin bonŝanca?
- 6) Kiuj estas viaj planoj por la venontaj tagoj / semajnoj / monatoj / jaroj?  
(venonta – next, tago – day, semajno – week, monato – month, jaro – year)

## Part 14 – Studoj

### New words for Part 14

|              |                           |                      |
|--------------|---------------------------|----------------------|
| lasta – last | universitato – university | facile – easily      |
| eĉ – even    | programisto – programmer  | instruisto – teacher |



|                        |                       |                      |
|------------------------|-----------------------|----------------------|
| flegisto – nurse       | kuracisto – physician | sukcesi – to succeed |
| momente – momentarily  | noto – note           | sufiĉe – enough      |
| diligente – diligently | paŭzo – break, pause  | fremda – foreign     |
| kulturo – culture      | kosti – to cost       | multe – much         |
| akiri – to get         | mono – money          | preti – to be ready  |

## Text for Part 14

Mi nun estas en la lasta jaro, antaŭ ol mi povos studi ĉe universitato. Estas iom malfacile scii, kion mi ŝatus studi tie... Eĉ malpli facile scii, kio mi ŝatus fariĝi! Ĉu programisto, ĉu instruisto, ĉu ĵurnalisto, ĉu flegisto? Eble mi ŝatus fariĝi kuracisto, se mi sukcesos eniri tiun universitaton. Momente miaj notoj ne estas sufiĉe bonaj, sed mi provas studi tre diligente nun. Mi ankaŭ pripensas fari paŭzon en la studoj dum iom da tempo. Estus tre interese povi vojaĝi en fremdaj landoj kaj renkonti novajn kulturojn! Sed tio kostus multe da mono kaj mi ne scias, kiel akiri tiun monon... Ankaŭ studi en universitato kostas multe da mono ĉi tie, sed miaj gepatroj pretas pagi por tio. Trovi iun laboron estas tre malfacile, do mi plej verŝajne studos ion post la somero... Sed kion?



## Grammar notes for Part 14

**-ist-**: A suffix used for a person who is regularly involved with something, often professionally.

E.g.:

|                    |                      |
|--------------------|----------------------|
| instrui (to teach) | instruisto (teacher) |
| flegi (to nurse)   | flegisto (nurse)     |
| arto (art)         | artisto (artist)     |
| esperanto          | esperantisto         |

**ol**: If you look in a dictionary, you'll find that **ol** means “than”, and that it is usually used for comparison. But **ol** also has another application. When **antaŭ** is followed by a clause that denotes a time, we say **antaŭ ol** (before). This usually means there's a verb in the clause. It's much the same with **post**, but instead of saying **post ol**, we normally say **post kiam** (after). However, it wouldn't be grammatically incorrect to say **antaŭ kiam** and **post ol**, although these variations are rare. E.g.:

Mi lernis la hispanan, **antaŭ ol** mi iris al Hispanio.

(I learned Spanish before I went to Spain.)

Ĉu vi telefonos al mi, **antaŭ ol** vi venos?

(Will you call me before you come?)

Maria trovis interesan laboron, **post kiam** ŝi diplomiĝis.



(Maria found interesting work after she graduated.)

## Hints on the text of Part 14

**studento – studanto – studisto:** A person who studies at a university or college is called a **studento**. A person who happens to be studying or observing something specific can be called a **studanto**. (The word \*studisto\* could refer to someone whose studies for a living, but since that profession doesn't really exist, the word isn't often used.)

## Questions for Part 14

- 1) Kio Ana ŝatus fariĝi, se ŝiaj notoj estos sufiĉe bonaj?
- 2) Kial ŝi verŝajne ne povos vojaĝi en fremdaj landoj venontjare?
- 3) Kion vi studis/as/os/us?
- 4) Kio vi ŝatus fariĝi?
- 5) Ĉu en via lando kostas studi en universitatoj?

## Part 15 – Malsataj

### New words for Part 15

sata – full, satiated

kafo – coffee

trinki – to drink

konsenti – to agree

fromaĝo – cheese

ĉiam – always

simpla – simple

Havajo – Hawaii

malmultekosta – cheap

ĉefe – mainly

ejo – place

ĝuste – right

fakte – actually

ĉi-foje – this time

si – himself, herself

preskaŭ – almost

ŝanco – chance

sia – his (own), her (own)

soifa – thirsty

pico – pizza

odori – smell

mendi – to order

kutime – usually

preferi – to prefer

manĝi – to eat

nu – well

## Text for Part 15

Ana: – Ĉu vi estas malsata?  
Mark: – Jes, iom. Sed mi estas ĉefe soifa.  
Ana: – Ĉu ni iru al picejo?  
Mark: – Mi preferus kafejon.  
Ana: – Sed mi estas tre picema.  
Mark: – Bone, ni iru al picejo. Ankaŭ tie ja eblas trinki kafon.  
Ana: – Ĝuste.  
...  
Mark: – Odoras tre bone en tiu ĉi picejo.  
Ana: – Mi konsentas. Ĉi tie la picoj estas kaj bongustegaj kaj malmultekostaj.  
Mark: – Sonas ege bone.  
Ana: – Ĉu ankaŭ vi malsatas nun?  
Mark: – Jes, fakte. Ankaŭ mi mendos picon.  
Ana: – Mi pensas, ke mi volas la picon kun kvar fromaĝoj ĉi-foje.  
Mark: – Kiel kutime. Vi ĉiam mendas ĝin.  
Ana: – Ne ĉiam. Iufoje mi preferas pli simplan picon.  
Mark: – Bone, sed preskaŭ ĉiam.  
Ana: – Kaj vi preskaŭ ĉiam manĝas picon Havajo, kiam vi havas ŝancon.  
Mark: – Jes, ĉar ĝi estas la plej bongusta!  
Ana: – Nu, ĉiuj havas sian guston.



## Grammar notes for Part 15

ĉi: This word indicates proximity in space or time. E.g.:

- tie (there)                      ĉi tie (here)                      (**tie ĉi** is also correct)
- tiu (that)                      ĉi tiu (this)                      (**tiu ĉi** is also correct)
- foje (sometimes)              ĉi-foje (this time)              (when **ĉi** is used with an adverb, the two words must be joined together; **ĉifoje** is also possible, but it's usually written with a hyphen: **ĉi-foje**)
- jare (yearly)                      ĉi-jare (this year)

## Hints on the text of Part 15

When we attach a proper name to a noun, we usually place the name after the noun; if the noun has **-n**, the name does not. That's why Mark **preskaŭ ĉiam manĝas la picon Havajo** (almost always eats the pizza known as "Hawaii" – i.e. Hawaiian pizza). Likewise, we say **Mi prezentas mian amikon Johano** (This is my friend John), and **Mi vidis la riveron Volgo** (I saw the river Volga).

## Questions for Part 15

- 1) Kion volas Mark trinki?
- 2) Kial Ana volas iri al picejo?
- 3) Kiel odoras en la picejo?
- 4) Kiun picon mendos Ana?
- 5) Kiu pico estas la plej bongusta, laŭ Mark?
- 6) Kion vi volas havi sur pico?

## Part 16 – Humoro

### New words for Part 16

kolera – angry  
iom – somewhat  
ĝoji – to be glad  
preferi – to prefer  
humoro – humour  
ŝanĝiĝi – to change  
decidi – to decide  
helpema – helpful  
funkcii – to function

krii – to scream  
gaja – cheerful  
rideti – to smile  
ripozi – to rest  
rapide – quickly  
pro – because of  
afabla – kind  
kontenta – content

laca – tired  
ridi – to laugh  
sana – healthy  
dormi – to sleep  
ŝanĝi – to change  
kialo – reason  
helpi – to help  
kutime – usually

### Text for Part 16

Kiam mi estas tre kolera, mi krias. Kiam mi estas tre laca, mi ofte estas iom malgaja. Kiam mi estas gaja, mi multe ridas. Kiam mi ĝojas, mi preskaŭ tutan tempon ridetas. Kiam mi malsanas, mi preferas ripozi kaj dormi. Mia humoro rapide ŝanĝiĝas. En unu momento mi povas esti bonhumora, tuj poste kolerega pro iu kialo. Kelkfoje mi decidas esti tre afabla kaj helpema al ĉiuj, sed tio kutime ne funkcias dum longa tempo. Bedaŭrinde mi tro facile koleriĝas. Speciale miaj gefratetoj ofte kolerigas min. Mi ŝatus esti malpli kolera kaj pli kontenta kaj dankema persono.



### Grammar notes for Part 16

**-et-**: A suffix that indicates a smaller or less intense version of something. E.g.:

- domo (house)      dometo (hut)
- ridas (laughs)      ridetas (smiles)

- gefratoj (siblings)    gefratetoj (young siblings)

**-eg-**: A suffix that indicates a larger or more intense version of something. E.g.:

- domo (house)            domego (mansion)
- ridas (laughs)           ridegas (laughs out loud)

**-ig-**: A suffix that creates transitive verbs denoting the causing of an action or a change. E.g.:

- Ŝi laboras. (She works.)    Mi laborigis ŝin. (I made her work.)
- Mi koleras. (I'm angry.)    Li kolerigis min. (He made me angry.)

Transitive verbs are those that *can* have an object.

**-iĝ-**: A suffix that creates intransitive verbs denoting changes of state. E.g.:

- Mi movas la manon. (I move my hand.)    Mia mano moviĝas. (My hand moves.)
- Mi finis la kurson. (I finished the course.)    La kurso finiĝis. (The course ended.)

Intransitive verbs are those that *cannot* have an object. When you learn a new verb, it's a good idea to learn if it's transitive or intransitive. That makes it easier to use **-ig-** and **-iĝ-** correctly.

## Hints on the text of Part 16

**ŝanĝi/ŝanĝiĝi**: Many languages have only one verb for “ŝanĝi” and “ŝanĝiĝi”, but in Esperanto, one is transitive (ŝanĝi) and the other is intransitive (ŝanĝiĝi). Notice the difference: “Ni ŝanĝis la horaron” (We changed the timetable); “La horaro ŝanĝiĝis” (The timetable changed). Other verbs that can present similar difficulties are:

[listo de verboj en via lingvo, kun ekzemploj de uzo en Esperanto; taŭgaj ekzemploj por la angla estas miksi/miksiĝi, boli/boligi, rompi/rompiĝi].

## Questions for Part 16

- 1) Kion Ana faras, kiam ŝi estas kolera?
- 2) Kia estas Ana, kiam ŝi estas laca?
- 3) Kion faras Ana, kiam ŝi ĝojas?
- 4) Kion preferas Ana fari, kiam ŝi estas malsana?
- 5) Kia ŝatus Ana esti?
- 6) Kion vi faras, kiam vi estas kolera?

## Part 17 – Kiel sentiĝas?

### New words for Part 17

senti – to feel

nervoza – nervous

vidi – to see

neniam – never  
timi – to fear  
trankvila – calm  
baldaŭ – soon  
pri – about  
mensogi – to lie

ofte – often  
eraro – mistake  
trankviliĝi – to calm down  
aperi – to appear  
horo – hour  
kredi – to believe

ĉiam – always  
frui – to be early  
trajno – train  
certi – to be sure  
minuto – minute  
nekredeble – incredible

## Text for Part 17

Mark: – Kiel vi sentas vin?  
Ana: – Mi sentas min iom nervoza.  
Mark: – Tio videblas.  
Ana: – Kiel sentiĝas por vi?  
Mark: – Sentiĝas tute bone por mi.  
Ana: – Mi pensas, ke mi neniam vidis vin nervoza.  
Mark: – Kelkfoje mi nervoziĝas, sed ne ofte.  
Ana: – Kial mi tiom ofte nervozas?  
Mark: – Eble ĉar vi timas fari eraron.  
Ana: – Jes, eble. Kaj mi ankaŭ timas malfrui!  
Mark: – Trankviliĝu, ni ne malfruos.  
Ana: – Sed la trajno ja malfruas preskaŭ horon.  
Mark: – Post unu-du minutoj ĝi aperos. Mi certas pri tio.  
Ana: – Kiel vi povas esti certa pri tio?  
Mark: – Mi sentas tion.  
Ana: – Kaj mi sentas, ke vi mensogas.  
Mark: – Mi neniam mensogas.  
Ana: – Tion mi ne kredas.  
Mark: – Bone, ne kredu. Sed jen la trajno aperas.  
Ana: – Nekredeble!  
Mark: – Ĉu ne bone?  
Ana: – Jes, tre tre bone, ege bone!



## Grammar notes for Part 17

**sentas**: The verb **sentas** is transitive and can have an object, e.g. **Mi sentas koleron** (I feel anger). If you want to say that something “feels good”, you can say **sentiĝas bone**.

The verb **senti** can also be used for other meanings, for which other languages sometimes use different verbs; e.g. **senti odoron** (to smell an odor), **senti tuŝon** (to feel a touch).

**5 × -n**: The **-n** ending is used in five different ways:

1. to indicate an object      Mi vidas vin. (I see you.)
2. to indicate direction      Li iras hejmen. (He is going home.)

3. to indicate measurement Ĝi kostas dek eŭrojn. (It costs ten euros.)
4. to indicate a point in time Tio okazos la trian de marto. (That will happen on March 3rd.)
5. instead of a preposition Mi ridas pro lia naiveco. / Mi ridas lian naivecon.  
(I'm laughing at his naivety.)

(Correct use of the **-n** ending is one of the most difficult aspects of Esperanto.)

## Questions for Part 17

- 1) Kial Ana ofte estas nervoza?
- 2) Kiom malfruas la trajno?
- 3) Pri kio Mark estis certa?
- 4) Ĉu Mark ofte estas nervoza?
- 5) Ĉu vi facile iĝas nervoza?
- 6) Kion vi timas?

## Part 18 – Longa vojaĝo

### New words for Part 18

veturi – to go, travel

flugi – to fly

vico – queue

kontroli – to check

finfine – finally

viro – man

preni – to take

montriĝi – to become apparent

per – with, by

alveni – to arrive

pasporto – passport

pasi – to pass

mirinda – wonderful

taksio – taxi

ŝoforo – driver

reveni – to return

flughaveno – airport

stari – to stand

vizo – visa

fino – end

ial – for some reason

buso – bus

pakaĵo – baggage

### Text for Part 18

Antaŭ iom da tempo mi faris longan kaj interesan vojaĝon kun amiko. Ni ekveturis de ĉi tie per trajno al la flughaveno. Poste ni flugis dum dek kvar (14) horoj! Kiam ni alvenis ni estis lacaj sed tre gajaj. Ni devis stari en longa vico por montri la pasporton kaj vizon. La kontrolado pasis senprobleme. Finfine en Pekino, la ĉefurbo de Ĉinio – kia mirinda urbego! Ial nia ĉina amikino ne estis en la flughaveno por renkonti nin. “Kion fari nun?” ni pensis. Multaj viroj kriis “Taksio, taksio!?” Ĉar ni ne vidis iujn busojn, ni decidis preni taksion. Ni montris adreson al



unu taksiŝoforo kaj li afable helpis pri la pakaĵo.  
Bedaŭrinde ni ne komprenis, kion li diris, kaj li ne  
komprenis nin... Post preskaŭ unu horo en la taksio ni  
alvenis, kaj nia amikino salutis nin kun granda rideto.  
Montriĝis, ke ŝi ne povis veni al la flughaveno, ĉar ŝia  
frateto estis iom malsana kaj ŝiaj gepatroj laboris. Ho, mi  
havis vere bonan tempon en Pekino kun miaj geamikoj!

## Grammar notes for Part 18

**re-**: A prefix used, like re- in English, to indicate repetition (“again”) or reversal (“back”). E.g.:

- veni (to come)      reveni (to come back, to return)
- fari (to do)      refari (to redo)
- uzi (to use)      reuzi (to reuse)

**-ind-**: A suffix used to indicate worthiness. E.g.:

- leginda libro (a book worth reading)
- farinda laboro (work worth doing)
- mirinda urbo (a wonderful city; literally: a city worth marvelling at)

**ĉef-**: A word root that is sometimes used as a prefix. E.g.:

- urbo (city)      ĉefurbo (capital city)
- ministro (minister)      ĉefministro (prime minister)

**ke**: A word used to introduce a common type of subclause. E.g.:

- Mi pensas, ke vi estas bela. (I think that you are beautiful.)
- Li vidis, ke mi foriris. (He saw that I left.)
- Montriĝis, ke ŝi ne povis veni. (It turned out that she couldn’t come.)

## Hints on the text of Part 18

**fine / finfine**: The word **fine** means “in the end, at last”; the word **finfine** adds emphasis and relief: “at long last, finally”.

**montriĝi**: The word **montriĝi** literally means “to become shown”, but it’s often used in the sense of “to turn out (to be)”, when someone discovers the true nature of a situation.

## Questions for Part 18

- 1) Ĉu vi bone komprenis la rakonton? Se ne, kion vi ne komprenis?
- 2) Ĉu vi ŝatas vojaĝi?
- 3) Ĉu vi preferas veturi per buso aŭ trajno?
- 4) En kiom da landoj vi estis?



- 5) Kiu estas via plej bona vojaĝo ĝis nun?  
6) Bonvolu iom rakonti pri ĝi.

## Part 19 – Hejme denove

### New words for Part 19

|                         |                        |                         |
|-------------------------|------------------------|-------------------------|
| kia – what kind of, how | sperti – to experience | imagi – to imagine      |
| aŭdi – to hear          | rakonti – to recount   | foto – photo            |
| sidi – to sit           | sidiĝi – to sit        | hasti – to rush         |
| hejmen – home           | hejme – at home        | promesi – to promise    |
| pri – about             | tasko – task           | kuniri – to go together |
| laca – tired            | laciga – tiring        | teni – to hold          |
| elteni – to endure      | kara – dear            | survoje – on the way    |
| okazi – to happen       |                        |                         |

### Text for Part 19

Mark: – Ana, saluton! Mi ne vidis vin dum longa tempo. Kia estis via vojaĝo?  
Ana: – Saluton, Mark! La vojaĝo estis bonega. Multon interesan mi spertis en Ĉinio.  
Mark: – Mi imagas. Estus interese aŭdi pli pri tio.  
Ana: – Bone, mi volonte rakontos al vi iam kaj ankaŭ montros fotojn, se vi volas.  
Mark: – Kial ne nun? Ni povus iri al kafejo kaj tie sidi kaj paroli.  
Ana: – Mi volonte farus tion. Eble morgaŭ. Sed nun mi devas hasti hejmen.  
Mark: – Kial?  
Ana: – Ĉar mi promesis helpi al miaj gefratoj pri iliaj hejmtaskoj hodiaŭ.  
Mark: – Mi komprenas. Eble mi povus kuniri kaj helpi vin pri tiu laboro, ĉu?  
Ana: – Bona ideo! Se vi vere volas tion. Miaj karaj gefratoj povas esti sufiĉe lacigaj.  
Mark: – Mi pensas, ke mi eltenos tion. Survoje vi povos iom rakonti pri via vojaĝo.  
Ana: – Jes kaj mi ŝatus aŭdi, kion vi faris, kiam mi estis for.  
Mark: – Tion mi rapide povos rakonti al vi, ĉar ne multe okazis.  
Ana: – Jen taŭga buso por ni. Hastu!  
Mark: – Mi venas!

### Grammar notes for Part 19

**hejme / hejmen:** The word **hejme** means “at home”, and the word **hejmen** mean “(to) home, homeward”. So, in **hejmen**, the -n ending is used to indicate direction.

**pri / per / kun:** It can be difficult to know which of these words to use. Here are some

explanations and examples:

- **kun** means “with, in the company of”, indicating togetherness:
  - Mi volas iri kun vi. (I want to go with you.)
- **per** means “with, by means of”, indicating the use of a tool or resource:
  - Ni iros per buso. (We’ll go by bus.)
- **pri** means “about”, and indicates a topic or theme:
  - Mi pensas pri vi. (I’m thinking of you.)

## Hints on the text of Part 19

**helpi vin / helpi al vi**: You can say both **Mi helpos vin** and **Mi helpos al vi**; the meaning is the same.

Word order in Esperanto is flexible and often changes slightly to alter the emphasis in the sentence. When Ana says **Multon interesan mi spertis en Ĉinio**, she’s changed the normal word order to emphasise **multon**.

## Questions for Part 19

- 1) Kia estis la vojaĝo de Ana al Ĉinio?
- 2) Kial Mark volas iri al kafejo?
- 3) Kial Ana devas hasti hejmen?
- 4) Ĉu Mark kuniros al la hejmo de Ana?
- 5) Kion ili faros survoje al la hejmo de Ana?

## Part 20 – Lingvoj

### New words for Part 20

evoluo – evolution

tero – earth

vorto – word

elparolo – pronunciation

parolanto – speaker

skribi – to write

ŝajni – to seem

ekzisti – to exist

baldaŭ – soon

tuj – immediately

terura – terrible

glate – smoothly

babili – to chat

paro – pair

mil – thousand

preskaŭ – almost

forgesi – to forget

tamen – however

komuniki – to communicate

Interreto – internet

el – out of

## Text for Part 20

Lingvoj estas interesaj por mi. Mi ne ŝatas lerni novan lingvon. Sed mi ĝojas aŭdi tute fremdan lingvon. La evoluo de lingvoj estas interesa, mi pensas. Mi aŭdis, ke ekzistas pli ol ses mil (6000) lingvoj sur la tero hodiaŭ. Multaj baldaŭ mortos kaj kelkaj novaj aperas. Kaj preskaŭ ĉiuj lingvoj evoluas. Kiam mi estis en Ĉinio, mi provis lerni kelkajn vortojn de la ĉina. Sed mi tuj forgesis ilin. Por mi la ĉina estas tre bela lingvo, sed ege malfacila... Kaj por ili mia lingvo estas tre malfacila. Kelkaj provis paroli angle kun mi en Ĉinio, sed estis malfacile kompreni ilin. Ilia elparolo estis terura. Sed tamen multe pli bona ol mia ĉina elparolo! Mia ĉina amikino parolas Esperanton. Ankaŭ mi estas Esperanto-parolanto. Per tiu lingvo ni povas glate komuniki. Ni ofte skribas kaj babilas per Interreto. Ŝajnas al mi, ke Esperanto kaj Interreto estas bonega paro por tutmonde komuniki facile kaj rapide!



## Grammar notes for Part 20

**interes-**: A word root that can be used in several ways. E.g.:

- interesa filmo (interesting movie)
- Lingvoj estas interesaj por mi. (Languages are interesting to me.)
- Lingvoj interesas min. (Languages interest me.)
- Mi interesiĝas pri lingvoj. (I'm interested in languages.)
- Ŝi parolis interese. (She speaks interestingly.)

**el**: A preposition that is sometimes used as a prefix. E.g.:

- |                     |                         |
|---------------------|-------------------------|
| • paroli (to speak) | elparoli (to pronounce) |
| • doni (to give)    | eldoni (to release)     |
| • pensi (to think)  | elpensi (to invent)     |

**inter**: A preposition that is sometimes used as a prefix. E.g.:

- |                     |                           |
|---------------------|---------------------------|
| • ŝanĝi (to change) | interŝanĝi (to exchange)  |
| • paroli (to speak) | interparoli (to converse) |

**si**: The so-called “reflexive pronoun”. It's used when the subject (the person or thing performing the action) reappears elsewhere in the sentence – but not if the subject is **mi**, **ni** or **vi**. E.g.:

- |                             |                                                   |
|-----------------------------|---------------------------------------------------|
| • Li pensas pri si.         | He is thinking about himself.                     |
| • Ana helpas al sia frato.  | Ana will help her (own) brother.                  |
| • (Ana helpas al ŝia frato. | Ana will help her (i.e. someone else's) brother.) |

- (Mi pensas pri mi. I am thinking about myself.)

**-ant-**: A participle suffix used to denote a person who does an action. E.g.:

- paroli (to speak)      parolanto (speaker)
- legi (to read)      leganto (reader)

(In all there are six participle suffixes in Esperanto. More on that in the chapter *Grammatical overview*.)

## Questions for Part 20

- 1) Ĉu Ana ŝatas lerni lingvojn?
- 2) Ĉu laŭ Ana la ĉina estas malbela lingvo?
- 3) Ĉu vi ŝatas lerni lingvojn?
- 4) Kiu(j) estas la plej bela(j) lingvo(j) por vi?
- 5) Ĉu Esperanto kaj Interreto ŝajnas al vi esti bona paro por tutmonde komuniki?
- 6) Kiom da lingvoj vi parolas?

## Part 21 – Ĉu ankaŭ vi?

### New words for Part 21

povi – to be able  
prave – right  
relative – relatively  
letero – letter  
amuze – fun  
simila – similar  
popolo – people  
kondiĉo – condition

eĉ – even  
dank' al – thanks to  
tiu – that  
diversaj – different  
ĝuste – right  
ŝanco – chance  
avantaĝo – advantage  
privata – private

oni – one  
bazo – base  
uzi – to use  
ekzemple – for example  
juste – fairly  
sendepende – independently  
super – over  
plezuro – pleasure

## Text for Part 21

- Ana: – Ĉu ankaŭ vi ŝatus lerni Esperanton?  
Mark: – Mi ne scias. Mi jam scipovas paroli en tri lingvoj.  
Ana: – Ĉu vi ne ŝatus scipovi paroli en kvar lingvoj?  
Mark: – Jes, sed mi ne havas multe da tempo nun.  
Ana: – Tempo por kio?  
Mark: – Por lerni novan lingvon. Oni ja bezonas multe da tempo por lerni novan lingvon.  
Ana: – Prave, sed la bazon de Esperanto vi povus sufiĉe rapide lerni.  
Mark: – Ĉu?  
Ana: – Jes, dank' al la strukturo de Esperanto eblas relative rapide eniri tiun lingvon.  
Mark: – Tion mi ne sciis. Sed kiel poste uzi la lingvon?  
Ana: – Unue per Interreto. Facile vi trovos leter-amikojn el diversaj landoj.  
Mark: – Tio eblas ankaŭ per ekzemple la angla.  
Ana: – Jes, certe, sed estas pli amuze per Esperanto, laŭ mi.  
Mark: – Pli amuze, ĉu?  
Ana: – Ĝuste kaj ankaŭ pli juste.  
Mark: – Kion vi celas?  
Ana: – Ke ĉiuj havas similan ŝancon lerni la lingvon, sendepende de gepatraj lingvoj.  
Mark: – Mi komprenas. Tiel neniu popolo havas grandan avantaĝon super aliaj popoloj.  
Ana: – Do, kion vi pensas?  
Mark: – Bone, mi provos.  
Ana: – Bonege! Poste ni povus kune vojaĝi en multaj landoj kaj ekkoni novan mondon...  
Mark: – Sonas bone. Sed mi havas unu kondiĉon.  
Ana: – Kiun?  
Mark: – Ke vi estos mia privata Esperanto-instruisto.  
Ana: – Volonte! Mia plezuro!  
Mark: – Dankon!



## Grammar notes for Part 21

**dank' al:** An expression meaning “thanks to”. You can also say **danke al**, but **dank' al** is more common.

**ĝuste / juste:** It's easy to confuse the words **ĝuste** (t) and **juste** (t).

**povi / scipovi:** The word **povi** means “to be able” and **scipovi** means “to know how (to do something)”. **Scipovi** is often used when referring to the ability to speak a language. It suggests a deeper level of proficiency than the simpler **povi**.

**du mil tricent okdek kvin (2 385):** When we write numbers out, the hundreds and the tens appear as single words. Everything else should be written and pronounced separately. E.g.:

- *tridek* (30), *tridek ok* (38), *naŭcent* (900), *kvar mil* (4000), *kvin mil sepcent dudek kvar*

## Questions for Part 21

- 1) En kiom da lingvoj scipovas Mark paroli?
- 2) Ĉu Mark volas lerni Esperanton?
- 3) Kiun kondiĉon havas Mark por lerni Esperanton?
- 4) Kion ŝatus Ana fari, kiam Mark parolos Esperanton?
- 5) Kial vi lernas Esperanton?
- 6) Kion vi pensas pri ĉi tiu kurso?

## Answers to the exercises

### Part 11

- 1) La vetero ĉe Ana estas pluva hodiaŭ. / Ĉe Ana estas pluve hodiaŭ. / Ĉe Ana pluvigas hodiaŭ.
- 2) La vetero ĉe mi dum vintroj estas ...[pluva/nuba/neĝa/ktp] / Ĉe mi dum vintroj estas ... [pluve/nube/neĝe/ktp]
- 3) Jes, mi ŝatas someron. / Ne, mi ne ŝatas someron.
- 4) Ĉe mi la vetero hodiaŭ estas ... [suna/varma/pluva/nuba/malvarma/ktp] / Ĉe mi hodiaŭ estas [sune/varme/pluve/nube/malvarme/ktp]

### Part 12

- 1) Ana kaj Mark biciklos al la “Centra Parko”.
- 2) Ne, Mark ne montros la parkon al Ana. / Ne, Ana montros la parkon al Mark.
- 3) Ili bezonas ĉirkaŭ kvardek kvin minutojn.
- 4) Ne, Ana ne sekvas Mark. / Ne, Mark sekvas Ana.
- 5) Ne, ili ne biciklu dekstren unue. / Ne, ili biciklu unue rekte antaŭen.
- 6) Jes, mi ŝatas bicikli. / Ne, mi ne ŝatas bicikli.

### Part 13

- 1) Post la somero Mark ŝatus labori kiel ĵurnalisto.
- 2) Ne, Mark ne havas ĵurnalistedukon. / Ne, Mark ne havas edukon kiel ĵurnalisto.
- 3) Laŭ Mark pli gravas personaj kontaktoj.
- 4) Somere Ana vojaĝos al Ĉinio.
- 5) Ĉar ŝi havos ŝancon vojaĝi al Ĉinio. / Ĉar ŝia riĉa onklo pagos por la vojaĝo.

- 6) Dum la venontaj tagoj mi planas ...

### **Part 14**

- 1) Ana ŝatus fariĝi kuracisto, se ŝiaj notoj estos sufiĉe bonaj.
- 2) Ĉar tio kostus multe da mono.
- 3) Mi studis/as/os/us ...-n.
- 4) Mi ŝatus fariĝi ...
- 5) Jes, en mia lando kostas studi en universitato. /  
Ne, en mia lando ne kostas studi en universitato.

### **Part 15**

- 1) Mark volas trinki kafon.
- 2) Ĉar ŝi estas malsata.
- 3) Tre bone odoras en la picejo.
- 4) Ana mendos picon kun kvar fromaĝoj.
- 5) Laŭ Mark la plej bongusta pico estas pico Havajo.
- 6) Sur pico mi volas havi ...-n.

### **Part 16**

- 1) Kiam Ana estas kolera, ŝi krias.
- 2) Kiam Ana estas laca, ŝi ofte estas iom malgaja.
- 3) Kiam Ana ĝojas, ŝi preskaŭ tutan tempon ridetas.
- 4) Kiam Ana estas malsana, ŝi preferas ripozi kaj dormi.
- 5) Ana ŝatus esti pli malpli kolera kaj pli kontenta kaj dankema persono.
- 6) Kiam mi estas kolera, mi ...

### **Part 17**

- 1) Eble ĉar ŝi timas fari eraron.
- 2) La trajno malfruas preskaŭ horon. / La trajno malfruas je preskaŭ horo.
- 3) Mark certas, ke la trajno baldaŭ venos.
- 4) Ne, Mark ne ofte estas nervoza.
- 5) Jes, mi facile iĝas nervoza. / Ne, mi ne facile iĝas nervoza.
- 6) Mi timas ... -i / -n.

### **Part 18**

- 1) Jes, mi bone komprenis la tekston. / Ne, mi ne bone komprenis la tekston.
- 2) Jes, mi ŝatas vojaĝi. / Ne, mi ne ŝatas vojaĝi.
- 3) Mi preferas veturi per buso / trajno.
- 4) Mi estis en *x* landoj.
- 5) Mia plej bona vojaĝo ĝis nun estas, kiam mi vojaĝis al ...



## **Part 19**

- 1) La vojaĝo de Ana al Ĉinio estis bonega.
- 2) Ĉar li ŝatus aŭdi pli pri la vojaĝo de Ana al Ĉinio.
- 3) Ĉar ŝi promesis helpi al siaj gefratoj pri iliaj hejmtaskoj.
- 4) Jes, Mark kuniros al la hejmo de Ana.
- 5) Survoje hejmen Ana rakontos pri sia vojaĝo.

## **Part 20**

- 1) Ne, Ana ne ŝatas lerni novan lingvon.
- 2) Ne, laŭ Ana la ĉina lingvo estas tre bela.
- 3) Jes, mi ŝatas lerni lingvojn. / Ne, mi ne ŝatas lerni lingvojn.
- 4) Por mi la plej belaj lingvoj estas ... kaj ...
- 5) Jes, al mi ili ŝajnas esti bona paro por komuniki tutmonde.
- 6) Mi parolas  $x$  lingvojn.

## **Part 21**

- 1) Mark scipovas paroli en tri lingvoj.
- 2) Jes, Mark volas lerni Esperanton.
- 3) La kondiĉo de Mark por lerni Esperanton estas, ke Ana estos lia persona instruisto.
- 4) Tiam Ana ŝatus vojaĝi kun Mark en multaj landoj.
- 5) Mi lernas Esperanton ĉar ...

## ***Translations of course texts, Parts 11-21***

### **Part 11 - Weather**

It's winter now in New York. It's raining... Yesterday it snowed, and today it is raining. Good weather to read a book... Hopefully the sun will shine tomorrow, because then I'm going bicycling with a friend. Actually, I like summer better than winter. In the summer, there is often warm weather here. I like it very much when the sun shines! When it's around twenty-five degrees Celsius (77F) it's perfect, I think. For me, it's too warm when it's sunny and over thirty degrees Celsius (85F). After the summer, it's pleasant when autumn comes with fresh air and a little rain. And after the winter, it's pleasant when spring comes, with warmer weather. Contrasts are good... Come out, sun!

### **Part 12 - Bicycling**

Mark: – What pleasant weather today!  
Ana: – Yes, perfect for bicycling. Sunny, and not very windy.  
Mark: – I think that [the wind] will blow more later.  
Ana: – Maybe. But it doesn't matter.  
Mark: – Where should we ride to?  
Ana: – I suggest that we bicycle to Central Park.  
Mark: – Sounds good.  
Ana: – Have you been there before?  
Mark: – Yes, a few times. But I don't know all of its parts.  
Ana: – I will show you the whole park.  
Mark: – Great! How much time will it take to reach it?  
Ana: – Normally I need about 45 minutes.  
Mark: – Should we get going?  
Ana: – Yes. Let's first go straight ahead, and then to the right.  
Mark: – I thought that we had to go left first...  
Ana: – No, no. Do you want me to ride in front of you?  
Mark: – Yes, good, I'll follow you.

### **Part 13 - What will you do?**

Ana: – Mark what will you do after high school?  
Mark: – That's a very good question!  
Ana: – So, you don't know, then?  
Mark: – I know what I would like to do.  
Ana: – What would you like to do?  
Mark: – I would like to work as a journalist.  
Ana: – Do you want to become a journalist?  
Mark: – Yes, exactly. Hopefully I'll become a journalist after the summer.  
Ana: – But you haven't been educated as a journalist!

Mark: – Education isn't the most important thing. Personal contacts are more important.

Ana: – Do you have them?

Mark: – What?

Ana: – Personal contacts at some newspaper, of course.

Mark: – Yes. Or more precisely, my father has them.

Ana: – You're lucky.

Mark: – We'll see. What about you?

Ana: – What about me?

Mark: – What are your plans after the summer?

Ana: – Please don't ask.

Mark: – I am guessing that you'd like to travel somewhere.

Ana: – You're completely correct. I'm going to travel to China over the summer.

Mark: – Great!

Ana: – Yes, I feel very lucky. My rich uncle will pay for the trip.

Mark: – Will you go alone?

Ana: – No, I'm going with my Esperanto friend from Boston.

Mark: – And after the summer you'll study, right?

Ana: – Yes, that's my plan, but I don't know at all what to study...

## **Part 14 - Studies**

Now I'm in the last year [of school] before I'll be able to study at a university. It is a little difficult to know what I would like to study there... Even more difficult to know what I would like to become! A programmer, a teacher, a journalist, a nurse? Maybe I'd like to become a doctor, if I'm able to enter that university. At the moment, my grades aren't good enough, but I will try to study very diligently now. I am also thinking about taking a break in my studies for a period of time. It would be very interesting to be able to travel in foreign countries and meet new cultures! But that would cost a lot of money, and I don't know how to get that money... Studying in a university also costs a lot of money here, but my parents are ready to pay for that. Finding work is difficult, so I will probably study after this summer... But what?

## **Part 15 - Hungry**

Ana: – Are you hungry?

Mark: – Yes, a little. But mainly, I'm thirsty.

Ana: – Should we go to a pizzeria?

Mark: – I would prefer a cafe.

Ana: – But I really feel like pizza.

Mark: – Ok, let's go to a pizzeria. You can drink coffee there, too.

Ana: – Right.

...

Mark: – It smells really good in this pizzeria.

Ana: – I agree. Here, the pizzas are delicious and inexpensive.

Mark: – It sounds really good.

Ana: – Are you hungry now, too?

Mark: – Yes, in fact. I'm going to order a pizza, too.

Ana: – I think that I want the pizza with four cheeses this time.

Mark: – As usual. You always order it.

Ana: – Not always. Sometimes I prefer a simpler pizza.

Mark: – Ok, but almost always.

Ana: – And you almost always eat a Hawaiian pizza, when you get the chance.

Mark: – Yes, because it's the most delicious!

Ana: – Well, everyone has their own taste.

## **Part 16 - Mood**

When i'm very angry, I shout. When I'm very tired, I'm a little melancholy. When I'm cheerful, I laugh a lot. When I feel joy, I'm constantly smiling. When I'm sick, I prefer to rest and sleep. My mood changes quickly. In one moment I can be in a good mood, and immediately after, very angry for some reason. Sometimes I decide to be very kind and helpful to everyone, but that doesn't usually work out for a long period. Unfortunately, I get angry too easily. My siblings especially often make me angry. I would like to be a less angry and a more content and thankful person.

## **Part 17 - How does it feel?**

Mark: – How do you feel?

Ana: – I feel a little nervous.

Mark: – That's visible.

Ana: – How do you feel?

Mark: – I feel just fine.

Ana: – I think that I've never seen you nervous.

Mark: – Sometimes I get nervous, but not often.

Ana: – Why am I nervous so often?

Mark: – Maybe because you are afraid of making a mistake.

Ana: – Yes, maybe. And I'm also afraid of being late!

Mark: – Calm down, we won't be late.

Ana: – But the train was almost an hour late.

Mark: – In a minute or two it'll show up. I'm certain of that.

Ana: – How can you be sure of that?

Mark: – I feel it.

Ana: – And I feel that you're lying.

Mark: – I never lie.

Ana: – I don't believe that.

Mark: – Ok, don't believe it. But look, the train has shown up.

Ana: – Incredible!

Mark: – Everything's ok, right?

Ana: – Yes, very, very good, very good!

## **Part 18 - A long voyage**

Some time ago, I took a long and interesting trip with a friend. We traveled from here to the airport by train. Then we flew for fourteen hours! When we arrived, we were tired but very cheerful. We had to stand in a long line to show our passports and visas. We passed the checks without a problem. Finally in Beijing, the capital of China – what a marvelous big city! For some reason, our Chinese friend wasn't in the airport to meet us. "What should we do now?" we thought. Many men were shouting "Taxi, taxi?!" Since we didn't see any buses, we decided to take a taxi. We showed an address to one taxi driver and he kindly helped with our luggage. Unfortunately we didn't understand what he said, and he didn't understand us... After almost an hour in the taxi, we arrived, and our friend greeted us with a big smile. It turned out that she wasn't able to come to the airport because her little brother was a bit sick and her parents were working. Oh, I had such a good time in Beijing with my friends!

## **Part 19 - Home again**

Mark: – Ana, hello! I haven't seen you in a long time. How was your trip?

Ana: – Hi, Mark! The trip was excellent. I experienced a lot of interesting things in China.

Mark: – I imagine. It would be interesting to hear more about that.

Ana: – Ok, I would gladly tell you about it sometime, and also show photographs, if you want.

Mark: – Why not now? We can go to a cafe and sit and talk there.

Ana: – I would gladly do that. Maybe tomorrow. But now I need to hurry home.

Mark: – Why?

Ana: – Because I promised to help my siblings with their homework today.

Mark: – I understand. Maybe I could come with you and help you with that work, couldn't I?

Ana: – Good idea! If you really want to. My dear siblings can be pretty tiring.

Mark: – I think I can withstand that. On the way you can tell a little about your trip.

Ana: – Yes, and I'd like to hear what you did while I was away.

Mark: – I can tell you about that quickly, because not much happened.

Ana: – Here's a suitable bus for us. Hurry up!

Mark: – I'm coming!

## **Part 20 - Languages**

Languages are interesting for me. I do not like learning a new language. But I am glad to hear a totally foreign language. The evolution of languages is interesting, I think. I heard that there are more than six thousand languages on Earth today. Many will die soon, and some new ones will appear. And almost all languages evolve. When I was in China, I tried to learn some words in Chinese. But I forgot them right away. For me, Chinese is a very beautiful language, but very difficult... And for them, my language is very difficult. Some of them tried to speak English with me, but it was difficult to understand them. Their pronunciation was terrible. However, it was much better than my Chinese pronunciation! My Chinese friend speaks Esperanto. I am also an Esperanto speaker. With that language, we can communicate smoothly. We often write and chat on the Internet. It seems to me that Esperanto and the Internet are an excellent pair to communicate worldwide, easily and quickly!

## **Part 21 - You too?**

Ana: – Would you like to learn Esperanto, too?

Mark: – I don't know. I already know how to speak in three languages.

Ana: – Wouldn't you like to know how to speak in four languages?

Mark: – Yes, but I don't have a lot of time now.

Ana: – Time for what?

Mark: – For learning a new language. You need a lot of time to learn a new language.

Ana: – That's true, but you can learn the basics of Esperanto pretty quickly.

Mark: – Really?

Ana: – Yes, thanks to the structure of Esperanto, it's possible to learn that language relatively quickly.

Mark: – I didn't know that. But how do you use the language afterwards?

Ana: – First, online. You will easily find penpals from different countries.

Mark: – That's also possible with English, for example.

Ana: – Yes, of course, but it's more fun with Esperanto, I think.

Mark: – More fun, really?

Ana: – Exactly, and also fairer.

Mark: – What do you mean?

Ana: – That everyone has the same chance to learn the language, regardless of their native languages.

Mark: – I understand. That way, no people had a great advantage over other peoples.

Ana: – So, what do you think?

Mark: – Ok, I'll try.

Ana: – Great! Later, we could travel together in many countries and get to know a new world...

Mark: – Sounds good. But I have one condition.

Ana: – What?

Mark: – That you'll be my private Esperanto teacher.

Ana: – Gladly! It would be my great pleasure!

Mark: – Thanks!